

Pola

Esperantisto

Esperantysta Polski

XXXII JARO

NRO 3

MARTO 1938

ELDONANTO — WYDAWCA

POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO

REDAKTANTOJ — REDAKTORZY

PROF. DR ODON BUJWID — MGR TADEUSZ HODAKOWSKI

Āperas la 20-an de ĉiu monato. Redakcian materialon oni petas sendi ĝis la 10-a de ĉiu monato. La redakcio estas rajtigita laŭ bezono ŝanĝi la tekston de manuskriptoj.

DE LA REDAKCIO.

Prezentante la du subajn artikolojn, ni tute ne volas diri, ke ni komplete samopinias. Ni publikigas ilin lojale, konsiderante, ke ĉiu povas eldiri sian opinion pri problemoj tiom

forte nin, esperantistojn, interesantaj. Kiel ĉefan mankon de la artikoloj ni vidas troan detalecon, intermiksadon de aferoj gravaj kun bagatelaĵoj, pro kio la esenca problemoj malklariĝas.

ESPERANTO KAJ UNIVERSALA ORGANIZO; CELO, KLOPODOJ KAJ PENADOJ.

Al Samideanoj M. Rollet de l'Isle, Hans Jakob kaj Louis Bastien, ĉefuloj de neŭtrala Esperanto movado, mi dediĉas ĉi studeton.

Mi antaŭdiras, ke mi ne akceptas nunan Esperanto-organizon ĉu pro ĝia formo, ĉu pro ĝiaj celoj, ĉu pro ĝiaj klopodoj kaj penadoj.

Mi ne aprobas nunan neŭtralan organizon, ĉar ĝi aspektas tro kiel organizoj kun religiaj, sociaj, naciaj kaj politikaj programoj.

Esperanto estas helpa lingvo, eltrova por utilo de la homaro, ilo por interkompreniĝo, absolute mankanta de ia ajn socia idealo: Esperanto, laŭ vidpunkto de universala organizo, devas utili al ĉiuj homoj, kiuj ĝin scias kaj pro tio bezonas neŭtralan centron, kiu fariĝus suno por planadoj, kiu povus kunigi ĉiujn esperantistojn senescepte koncerne iliajn kredojn.

Nuna organizo tutmonda ne taŭgas verajn bezonojn kaj eĉ malhelpigas, mi diras ne nur disvastigon, sed bonan aŭ eĉ indiferentan juĝon pri la afero.

Jese, nevera ueŭtraleco de la tutmonda organizaĵo estas unua kaŭzo de malestimo pri Esperanto kaj tiuj personoj, kiuj estras centran movadon ankoraŭ ne volas konvikiĝi pri ĉi tio. Ili tre malpravas!

Profunda reorganizo bezonigas, tuja ŝanĝo de nunaj direktivoj kaj bona rekonstruo de neŭtrala Esperanto-centro devas tuj fariĝi penado de ĉiuj respondeculoj kaj de izoluloj.

Mi ne tuŝas iomete fakajn asociojn. Ili ekzistas, ili laboras ĉu bone, ĉu malbone por homaro, mi ne volas pridiskuti. Certe ili agas laŭ siaj programoj, do mi ilin lasas agi trankvile.

Ĉia esperantisto — homo scianta helpa

lingvon de dr Zamenhof — povas sin servi de Esperanto pro siaj personaj celoj, penadoj, konvinkoj. Aliĝu sen mia pridiskuto al tiuj asocioj, kiujn li opinias utilaj al siaj laboroj.

SĜD CENTRA ORGANIZAĴO ESTAS ALIA AFERO!

Centra organizaĵo reprezentas al tuthomaro ian ilon, ilon kiu celas helpi homojn per facila interkomprenilo, tiel kiel radio celas faciligi aŭdon de malproksimaj sonoj, kiel aŭtomobilo celas helpi por vojaĝi ĉian ajn homon, kiel ĉia homa eltrovo povas utili ĉiujn, kiuj volas ĝin uzi.

Esperanto estas nune nur naiva, infana eltrovo kaj ankoraŭ ne rajtigata de ia ajn oficiala institucio ĉu nacia, ĉu internacia. Pro tio ĝi bezonas centran organizaĵon iom laboreman kaj helpeman.

Nur ĉi tio. Kaj ni esperantistoj devas ĉiam havi antaŭ niaj okuloj tiajn yerojn. Alie ni eraras kaj eragigas.

Do, mi diris, ke nuntempa centra organizaĵo ne taŭgas, sed eĉ maltaŭgas al Esperanto.

Kial?

Du tiel diritaj neŭtralaj tutmondaj asocioj, unu akademio, stranga kaj neebila ligo de naciaj societoj (pli granda absurdo ol tia ne estas imagebla!), malsufiĉa kontrolo en Esperanto-literaturo.

Ĉio kunmetite kondukas Esperanton al abismo kaj detruo.

Bona neŭtrala organizaĵo estas necesega kaj ĉiuj samideanoj havas devon pristudi la problemon kaj agi ĉu izole, ĉu are por ĝia efektivigo.

Dua duonjarcento jam komenciĝis, sed Esperanto ne troviĝas en bonaj kondiĉoj moralaj kaj materialaj. Oni devas per ĉiaj fortoj agi energie kaj profunde. Ĉia malnova kutino estu forlasata kaj al novaj tempoj donu, ankaŭ por Esperanto, novan vivon, vivon taŭgan por dua epoko.

Komencu ni per nuligo de nunaj internaciaj Institucioj, t. e. UEA IEL kaj Akademio; ni organizu ununuran neŭtralan esperanto-centron (atentu ne esperantistan aŭ esperantisman!) Tiu nova organizaĵo estu nomata TUTMONDA ESPERANTO-CENTRO kun sidejo en mez-Eŭropo, ekz. en Svisujo aŭ eĉ en Lichtensteino kaj ĝi estu precipe centro de Esperanto.

Celoj — klopodoj — penadoj.

Unue mi deklaras, ke Tutmonda Esperanto-Centro -- TEC devos esti absolute neŭtrala kaj malinteresiĝa pri sociaj, religiaj, filozofiaj, klasaj, politikaj problemoj. Ĝi sin okupos nur pri helpa lingvo Esperanto laŭ reguloj de la Fundamento kaj verkaro de

Zamenhof, kaj agos laŭ Deklaracio de Boulogne; ĝi konsideros Esperanton ilo por ĉiuj homoj por interkompreniĝo kaj klopodos por ĝi kiel bonega eltrovo de homa genio.

Nediskutebla neŭtraleco estas kvalito bezoniga al TEC, por ke ĉiu esperantisto povu aliĝi al ĝi sen ia ajn dubo kaj por ke ĉia ŝtato povu ĝin akcepti sen rezervoj iaj ajn.

Rilate al ĝiaj laboroj, celoj, klopodoj mi diras tuj, ke ĝi estos scienca institucio, t. e. lingva organizaĵo Ĝi kreos en si mem kelkajn fakojn, ekz. lingva (nuna Akademio), kritika (por kritiko de Esperanto-presajoj kaj por tralegado laŭvola de manuskriptoj), gazeta (por redaktado de oficiala eble duonmonata gazeto), servada (por helpi uzon de E. al ĉiuj esperantistoj, siaj anoj), eldoneja (por eldonado de oficialaĵoj, zamenhofaĵoj, gazeto, ktp.), kaj aliaj.

LINGVA FAKO: devos reprezenti nunan akademion kaj nunan ligvan komitataron. Oni elektos estonte ne Ligva-Komitatanon, sed nur Akademianojn dumvivajn. El tiaj spertuloj oni elektos malgrandan nombron por aktiva komitato kaj ilia elekto daŭros limigitan tempon, 4 aŭ 5 jarojn. Ĉi Akademia Komitato havos samajn klopodojn kiel nun la akademianoj.

KRITIKA FAKO: zorgos pri ekzameno de ĉiuj presajoj, radio-paroladoj, ktp. kaj pere de oficiala gazeto publikigos ĝiajn studojn kaj recenzojn. Ne estas facile diri, kiom utilis al la esperantistaro severaj studoj de ĉiaj presajoj!

Tralegado laŭvola de manuskriptoj estus ankaŭ pli utila ol recenzoj.

GAZETA FAKO: penados por redaktado de oficiala duonmonata gazeto, kiu estos nomata nur „ESPERANTO“ Ĝia formato estos ne tro granda kaj ne tro malgranda, nek estos tagĵurnalo kaj nek revuo: mi opinias, ke bonega formato estus cm 35x25, 8/12 paĝoj po numero kaj ĉia paĝo 4-kolona.

Iom granda formato bone utilis por taŭga prezento de iaj gravaj artikoloj, 8/12 paĝoj sufiĉas por aperigi iom el ĉiaj gravaj argumentoj (studoj pri lertuloj kaj propagandistoj, originalaj kaj tradukaj literaturaĵoj, ligva angulo, anoncoj, vivo en Esperantujo, ktp. ktp.); duonmonateco estas bonega periodeco, ĉar ne tro ofta kaj ne tro malofta. Fine jara kolekto estas bona libro de 240 pli-malpli paĝoj.

SERVADA FAKO: estas gravega kaj interesos ĉiujn esperantistojn pro ĝiaj servoj. Ĝi ne estos io alia ol nunaj internaciaj asocioj — UEA kaj IEL — sed estos pli bona, ĉar flanke de siaj utiloj ĝi donos plenan kontakton kun tuta laborado de TEC.

Oni povus noti, ke lingva institucio — kiel povus ŝajni TEC — ne rajtas okupiĝi pri servado kaj propagando. Erarego! Kio pli ol lingva institucio rajtas disvastigi konon de siaj penadoj kaj faciligi utilon praktikan de siaj laboroj?

Precipe lingva organizaĵo rajtas defendi, diskonigi, utili al Esperanto!

ELDONEJA FAKO: Kiaj celoj? Ĉu fariĝi komerca eldonejo? Eĉ iom, sed por utilo de esperantistaro tutmonda!

Unue ĝi zorgos ĉiudujaran aperadon (ne ĉiujaran!) de JARLIBRO — eldono oficiala de la Esperanto movado. Tia eldono multe pli granda ol la nunaj de UEA kaj IEL — 1000 paĝoj — enhavos plenan adresaron de esperantistoj en ĉiuj lokoj (eble! kaj pere de naciaj E. Institutoj) de la mondo, senescepte ĉu ili estas delegitoj de TEC aŭ ne. Nomoj de delegitoj estas presataj per nigraj literoj, tiaj de nedelegitoj per kutimaj literoj. Plie en ĝi oni pritraktos ĉiajn aferojn de Esperanto-movado, okazintaj dum pasintaj dujaraj; decidoj de ĉiaj fakoj kaj de aliaj asocioj.

Jarlibro — dujara — enhavos veran panoramon de Esperanto vivo.

Alia eldono estos la gazeto „ESPERANTO“ duonmonata, kiu estos sendota al ĉiuj anoj de TEC.

Fine Eldoneja Fako okupiĝos pri eldonado de oficialaj verkoj de Lingva F., de gravegaj verkoj utiligaj al tutmonda esperantistaro, kaj aliaj.

FAKOJ DE LINGVAJ INSTITUTOJ: federaciigos ĉiujn institutojn de Esperanto, ekzistantajn en ĉiuj landoj de la mondo.

Jen nura federaciiga fako ebla en la Esperanto-movado!

Tia de institutoj de E. estas la nura federacio ebla en nia movado, ĉar nur kunestigo de ĉi organizaĵoj estas bona kaj vere neŭtrala.

Plie unuecigo de Lingvaj Institutoj plifaciligos homogenan laboron en diskonigo de la lingvo.

Ĉi nova organizaĵo estus — laŭ miaj vidpunktoj — tiu, kiun bezonas tuj nia movado. Restas nur vidi, kiel oni povos akcepti anaron kaj laŭ kiaj kondiĉoj.

Ciu esperantisto rajtos aliĝi al TUTMONDA-CENTRO kaj utiligi ĝiajn servojn nur per jara pago de sumeto aŭ per dumviva kotizo.

Jarlibrajn membrojn oni ne povos akcepti, ĉar tiu verko aperos nur podujare. Do oni havos nur OM (ordinarajn membrojn), SM subtenantajn membrojn kaj DM (dumvivajn membrojn). Tiuj samideanoj, kiuj volos aĉeti jarlibron sen pagi plenan kotizon de OM, povos ĉi tion fari per pago de sv. fr 3, sed

ili ne rajtos uzi servadojn de TEC.

Ordinaraj membroj (OM) pagos sv. fr. 8-10 jare kaj rajtos ricevi la jarlibron, kiam ĝi aperas kaj la gazeton; subtenantaj membroj (SM) krom tio donata al OM, premion en libroj rajtos ricevi kaj pagos sv. fr. 20; dumvivaj membroj (DM) rajtos nur kiel OM kaj pagos sv. fr. 100.00.

Por malebligi nedaŭran pagadon de kotizoj, precipe dum jaroj de neapero de la Jarlibro, oni fiksos enskriban kotizeton nur por OM, kion oni devos pagi ĉu je nova aliĝo, ĉu je interrompita pagado de jaraj kotizoj. Tia sumeto estos sv. fr. 1.

Elekto de akademianoj estas sendependa de aneco al TEC, sed akcepto de tia elekto devos esti kunigata de dumviva aliĝo al TEC.

Ceteraj estraroj de TEC aŭ ĝiaj fakoj devos esti membroj de TEC kaj pagi antaŭe kotizojn por ĉiuj jaroj de daŭro de ilia elekto, se ili ne estas jam dumvivaj membroj.

* * *

Resume mi deklaras, ke mi permesas ankaŭ kritikon al mia budĝeto, sed volas atentigi la legantaron pri mia unua kaj ĉefa zorgo: montri al la tutmonda esperantistaro la nunan haoson en centra organizado kaj eblecon ĝin forpuŝi por nia estonta venko.

Nuna ne tro klara situacio kaj laborado de centraj institucioj malfaciligas disvastigon de Esperanto kaj nuligas penadojn de entuziasmoj por fina akcepto de ĉi mirinda eltrovo por interkompreniĝo. Ialoke eĉ oni malpermesis propagandon de Esperanto. Tio signifas, ke oni laboras malĝuste kaj malklare.

Antaŭ ĉio estas bezonata klareco en ia ajn laborado, kaj pro tio ankaŭ en nia movado.

Nuna organizado ne estas bona, eĉ malbona kaj daŭrigi ĉi tian situacion signifas voli pereon de tiom longa penado.

Mi estas proponinta solvon bonan ĉu rilate al la lingvo, ĉu rilate al la propagando, sed mi ne rifuzas opiniojn kaj konsilojn de samideanoj.

Mi estos tre feliĉa, se mi havos plezuron ricevi amase kaj grandnombre leterojn de samideanoj el ĉiuj landoj, ĉu ili skribos kiel grupestroj, ĉu ili skribos kiel izoluloj.

Mi atentegas ĉiajn enhavojn kaj publikigos ĉefajn pensojn.

Min interesegas solvo de nuna malbona situacio kaj kreo de neŭtrala, vere neŭtrala, organizaĵo.

Tiuj samideanoj, kiuj volos skribi al mi por faciligi prilaboron de ebla nova centra organizaĵo, bonvolu sendi leterojn al

CORRADO CERRI, Instruisto
Romazzano (Perugia - Italujo).

INTERŜTATA ESPERANTO-AKORDO.

Ĉefa ideo: Ses registaroj reciproke promesos: Ni enkondukos la instruadon devigan de Esperanto en ĉiujn lernejojn de nia lando, se vi promesos fari la samon.

Gvidanto informa de la penado: dro Antoni Czubyński, Włochy pod Warszawą, Wesola 32, Polujo.

Gvidantoj: naciaj esp. asocioj, ĉiu en sia lando.

MALFERMITAJ LETEROJ.

Ĝenerale.

Dum la preparaj laboroj por sukcesigi penadon pri IEAk ekzistas etapoj unuaplanaj, pri kiuj oni devas klopodi antaŭ ĉio, kaj aliaj dua-planaj. Al unuaj certe apartenis la dissendo de la sciigoj pri la rezolucioj de Jubilea Kongreso Esp. 1937 al la registaroj kaj popularigo de la ideo pri IEAk en Esp. gazetaro, por kio oni bezonis multe da laboro kaj tempo de kelkaj personoj, kiuj sin dediĉis tutkore al ĝi. Alimaniere la tuta rezolucio estus forgesota, kiel tio ĉi ofte okazadis dum diversaj kongresoj. Nune la unua parto de laboro estas finita kaj de nun oni povas, transdoninte pluan laboron en la manojn de naciaj kaj landaj komitatoj, ĉiu en sia patrujo, alvoki ilin al plua daŭrigado de laboro, en kiu ni kompreneble ne povas nin intermiksi, nek povante samtempe ĉie esti, nek havante por tio monrimedojn. Nia plua rolo estos kontroli kaj kolekti informojn pri la tuta laboro, por ke ni povu ĉiumomente servi per la informoj al tiuj, kiuj ilin bezonas.

Oni ne povas agi senplane. Ni devas klopodi pri la aliĝo de ŝtatoj en ĉirkonstancoj tre por tio ĉi malfavoraj, en la periodo de aŭtarkioj, de militaj kaj antaŭ - militaj preparoj, ne estante certaj, ĉu iu eksplodonta milito ne deruos tutan nian laboron. Tial per larĝe malfermitaj okuloj kaj oreloj ni devas rigardi kaj aŭdi ĉion, por kapti la momentojn por ni la plej favorajn, kiuj post kelkaj monatoj povas tute malaperi.

Unuaj paŝoj.

Pri ili mi skribis en antaŭa artikolo: en du landoj io jam prepariĝas, pri kies rezulto ni ne povas ankoraŭ ion antaŭvidi, sed se ĝi estos favora, ni sciigos ĉiujn prese.

Al italaj samideanoj.

Pri la graveco de la klopodoj, ke via lando aliĝu al IEAk mi jam antaŭe skribis. Sed ĝis nun krom unu karto ni ricevis neniun sciigon. Ni ĝenerale ne scias, ĉu iu komencis jam labori en tiu ĉi direkto. Ni ree petas pri la informoj kaj antaŭ ĉio pri formigo de grupo de personoj, kiu ne bezonas esti granda, sed oferema kaj laborema kaj kiu zorgus informi pri IEAk la direktantajn klerigajn faktorojn kaj decidopovajn personojn.

En la nro de ĝeneva Esperanto (nro 457/3) el 15 de februaro 1938 ni trovas la eldiron de duce B. Mussolini: „Formiĝas speco de tutmonda dialekto, tekniko kaj sporto formas ĝin mem. Sed ia esperanto nur detruus ĉian literaturon kaj kio fariĝus el la mondo sen literaturo?“.

Ne estas bedaŭrinde dirite, el kiu jaro ĝi devenas, sed malgraŭ, ke ĝi estas bazita sur manko de bonaj informoj pri Esp. literaturo, oni povus ĝin facile pravigi, montrante la publikaĵojn, kiujn eldonis „Ministerio per la Stampa e la Propaganda Direzione Generale per il Turismo“ por propagando de sia patrujo. Tiun ĉi turistan flankon oni, laŭ mi, povus bonege elprofiti por montri, kiel grandan utilon havus Italujo el disvastiĝo de Esp. en la tuta mondo, se la fremduloj venintaj al Italujo, por admiri ĝian belecon, povus bone interkomunikiĝi per Esperanto anstataŭ lame balbuti itale. Aliĝo de Italujo malfermus la pordojn al IEAk-ideo, kio okazas en ĝi, plue en Afriko, ĉar Duce estas en musulmana mondo konsiderata kiel defendanto de Islamo, eble ĝi havus ankaŭ siajn perajn influojn en Germanujo, kun kies gvidanto, li estas nuntempe en bonaj rilatoj.

Ni tamen nenion altrudas, ni nur proponas. Eble do troviĝos en Italujo personoj, kiuj klopodos pri tio. La tuta mondo esp. estos al ili dankema. Ni nia flanke estas pretaj helpi per ĉiuj eblaj rimedoj (krom la monaj), se oni turnos sin al ni.

Al esperantista sekcio de Eŭkaristia Kongreso en Budapest.

Paralele kun la klopodoj celantaj akiri Italujon al IEAk devas progresi la komencaj laboroj por akiri Katolikan Eklezion por la sama Akordo. Iu eble diros, ke ni ne povas nin intermiksi en religiajn problemojn, ĉar nia movado estas neŭtrala. Mi respondas: se ĝi estas eĉ neŭtrala, tio ne signifas, ke ĝi ne klopodu enpenetri en ĉiujn religiojn per la lingvo kiel rimedo. Grandega lerneja aparato, dissemita sur la tuta terglobo, per kiu disponas Eklezio Katolika, ĉiuj fakultatoj teologiaj, lernejoj konfesiaj, monaĥejoj, kongregaciaj kaj aliaj estas reto tiel ampleksa kaj potenca, ke el lerneja vidpunkto, se ni eĉ preterlasus alian (grandan aŭtoriti-

taton por milionoj da katolikoj) Eklezio Katolika fariĝas unuaranga potenco lerneja. Tion ĉiu komprenos, eĉ ne-katoliko, eĉ ne-kristano. Ne temas do pri teritorie malgranda Città di Vaticano, sed pri araneaĵa reto de lernejoj sur la tuto terglobo.

Tiun reton de lernejoj ni provu ekposedi por IEAk:

Jen la paŝoj, kiujn ni devas entrepreni por tion realigi:

a) Enmeti en la tagordon de sekcio esperantista de Eŭkaristia Kongreso en Budapeŝto la 26-29 de majo 1938 la punkton: aliĝo de Katolika Eklezio por IEAk,

b) akcepti rezolucion, ke oni alvokas katolikajn organizojn helpi tiudirekte,

c) krei komitaton konsistantan el katolikaj agantoj sacerdotoj kaj laikaj, kiu klopodus redakti la petskribojn al Papo XI, ke estus por disvastigo de katolika religio tre utile, se Esp. estus disvastigita en ĉiuj landoj de nia globo kaj tial tre dezirinde, ke Eklezio Katolika aliĝu al lerneja IEAk, kiel unu el promesantoj. La subskribantoj ĉefepiskopoj, episkopoj kaj sacerdotaro esploriginte la movadon esp. kaj ideon pri IEAk subtenas ĝin kaj prezentas al Papo por ekopinio.

Mi kompreneble ne pretendas doni la rezolucion en ĝia, ĝis lasta detalo ellaborita formo, sed nur skizan sugeston por ĝi, kiun prilaboros sekcio esp. de tiu ĉi kongreso. La rezolucion laŭ mi oni ne bezonas prezenti al pleno de la kongreso, ĉar ĝi ĝin eble ne komprenus, sed nur al Esp.-katolikaj organizoj.

Tiun rezolucion oni prezentos post ĝia preparo kaj kolekto de opinioj al Papo. Jam nun oni devas ĉion prepari, precipe kolektadi subskribojn de katolikaj eminentuloj, ĉar tiu ĉi laboro postulos multe da tempo kaj zorgoj.

Estas interna afero de tiu ĉi sekcio kaj ĝenerale de la esp.-katolika movado, kiun ĝi elektos por gvidantoj de la tuta grava entrepreno. Laŭ mi la plej aŭtoritata en tiu ĉi direkto estus sam. sac. Andreo Ĉe loĝanta nun en Den Haag, Riouvstraat 172, Nederlando, se li trovos tempon kaj konsentos.

Aliĝo de Eklezio Katolika al IEAk havus grandan influon je la tuta mondo.

Samtempe ni atentigas ĉiujn aliajn katolikajn organizojn kaj la kat. gazetaron.

Tiel Italujo kaj Katolika Eklezio povus larĝe malfermi la pordojn por IEAk penado kaj fari el ĝi efektive grandiozan penadon.

Al brazilaj kaj argentinaj semideanoj: Plano sud-kaj mez-amerika.

Norda Ameriko konsistas el grandaj teritorioj, lingve homogenaj kaj aŭtarkiaj, en

kiu oni ne eksentas neceson de iu helplingo, povante ĉie esti komprenata angle. Tial eble-se mi ne eraras-Usono kaj Kanado ne marŝos unuavice inter la landoj aliĝontaj al IEAk. Lasante la klopodojn pri aliĝo de USA kaj Kanado al lokaj samideanoj, mi volus pritrakti la problemon laŭ miaj antaŭvidoj pli facile solveblan: pri la aliĝo de Suda kaj Meza Ameriko al IEAk.

Tiu ĉi granda tereno, konsistanta krom Guyana el 10 republikoj en Suda kaj el 8 en Meza Ameriko, uzas ĉefe du lingvojn kaj meritas specialan atenton. Laŭ kompilitaj sciigoj el la gazetaro, jarlibroj de UEA kaj IEL kaj adresaro de sam. Hugo Steiner eldonita en januaro 1938, ni povas konstati, ke tie decidus pri IEAk ĉefe kaj unuaplane la registaroj de du landoj: de Brazilo kaj de Argentino. Aliaj plej verŝajne sekvus tiujn ĉi du. La Esp. movado en aliaj respublikoj ne ŝajnas esti tro forta. Kelkaj el ili eĉ ne posedas organizon specialan. En ili loĝas izoluloj eble bonaj esperantistoj, sed sen tro grandaj influoj.

Do la elirpunkto kaj la ĉefa zorgo devas esti Brazilo, kies speciale favoran al Esp. sintenon oni eble povus elprofiti, instigante la registaron al subskribo de IEAk. Inter la nomoj de loka esperantistaro mi rimarkas kelkajn nomojn de profesoroj de universitato kaj de aliaj verŝajne influemaj personoj. Se ili komune subskribus la petskribon al registaro, eble ili sukcesus. En la plej favoraj cirkonstancoj, se ili jam ricevus aliĝon de ilia patrujo al IEAk, ili eble povus peti, ke ilia registaro sendu invitilojn al aliaj 17 sud-kaj mez-amerikaj respublikoj, ke ili sekvu ekzemplon de Brazilo kaj kune kun ĝi aliĝu al Akordo. Kion pri tiu ĉi demando opinias brazilaj kaj argentinaj samideanoj? Ĉiu helpo informa niaflanke estas garantiata. Ni afable petas respondon.

Al danaj semideanoj:

El 2 nro de „Pola Esperantisto“ ni eksciis, ke via Instrua Ministerio per cirkulero donis ŝtatan subtenan kotizon al Esp. instruado. Ni gratulas! Sed ĉu al tiu ĉi prudenta ministro, ekkompreninta la gravecon de Esp., vi ne povus proponi: 1) aliĝon de via lando al IEAk, 2) se li ĝin donus peti lin, ke li invitu aliajn skandinavajn landojn fari la samon, ke vi ĉiuj aliĝu bloke al IEAk? Kion vi opinias pri tio ĉi? Ni petas informojn.

Al francaj samideanoj:

Kelkfoje mi jam rimarkis, ke okcidentaj samideanoj opinias, ke iun komencon pri IEAk aŭ pri enkonduko de Esp. en la lernejojn devige en unu lando (kio ĝis nun nenie oka-

zis kaj estas malplej verŝajna) povas fari iu malgranda nacio. Efektive estas tute kontraŭe: la ministerioj de tiuj ĉi ŝtatoj atendas la decidon de la landoj, portantoj frunte en la vico de nacioj la torĉon de progreso, sekve Francujo aŭ Britujo. Tial aliĝo de Francujo havus pli grandan signifon ol eĉ de kelkaj ŝtatoj, laŭ loĝantaro samnombraj aŭ eĉ pli nombraj.

Ĉu tiu ĉi lando, kiu tiel modele organizis Pentekostan Konferencon Pedagogian en 1937 ne povus fari iun paŝon, por ke Francujo aliĝu al IEAk?

Al organizantoj de Londona Kongreso:

Ni petas afable enmeti en la tagordon de XXX Un. Kongreso la demandon pri IEAk.

Al norvegaj samideanoj:

Vi demandas nin, kio signifas en la teksto de Akordo: „Comité international de l'Esperanto à Genève“. Ni respondas: Teksto franca de la Akordo devenas de la jaro 1923. Tiam Komitato estis UEA, poste ICK kaj ĉefa aganto, multmerita dro Edmond Privat. Nune ICK plu ne ekzistas, anstataŭ unu ni havas du organizojn, do la ŝtato aliĝonta al IEAk povus sciigi ambaŭ, aŭ plej bone la nacion Asocion Esp., sekve en via lando Norvegan, kiu sciigus siavice Esp. gazetaron. Ministerio de aliĝonta ŝtato farus multe pli efike, sendante krom tiu ĉi sciigo ankaŭ aliajn al la ministerioj de klerigado en aliaj ŝtatoj, per kio ĝi favore agordus ilin por estonta aliĝo al IEAk.

Klopodante por permeso pri instruado de Esp. nedevige en popolaj lernejoj, vi eble

samtempe scipovus akiri saman permeson ankaŭ por aliaj lernejoj. Kial sin limigi nur al popolaj lernejoj, se ankaŭ en aliaj povus troviĝi volontaj lernantoj?

Se vi prezentus en favora por tio momento proponon pri IEAk, vi povus ĝin prezenti ne kiel ion nunmomente aktualan, sed apartenantan al la estonteco iom pli malproksima (7-10 jaroj). Per tio oni ne fortimigas la decidontajn oficistojn al propono, por kiu ili ne ĉiam estas preparitaj kaj kiun ili volas forŝovi en pli malproksiman estontecon. Se tamen tiu estonteco aperus pli proksima, oni ĉiam povus diri: la cirkonstancoj estis escepte favoraj... Krom tio oni povus konsoli timemajn oficistojn, ke la deviga instruado okazus ne tuj, do pograde: seminarioj lernejoj, lernejoj maristaj, aviadistaj, militaj, poste komercaj kaj fine aliaj... ke temas pri principa aliĝo...

Ŝajnas al mi, ke multe helpus al la aliĝo de la ŝtato al IEAk subskriboj de konataj personoj en la lando, ne nur de esperantistoj, de partioj kaj societoj politikaj, religiaj, kulturaj. Sed pri tio vi certe pli bone scias, estimataj samideanoj, ol mi malproksimulo.

Via ministerio por Ekstero kvitancis ricevon de nia raporto kaj transdonis al klerigaj faktoroj.

Al baltaj kaj balkanaj samideanoj:

Ni petas sciigon kaj informojn.

Al ĉiuj:

Ni petas aldonadi al la leteroj postulantaj la respondkuponojn.

Dro Antoni Czubryński.

DRO HENRYK DATNER.

LA ROLO DE KRAKÓW POR DISVOLVO DE AMIKAJ, KULTURAJ, POLITIKAJ KAJ EKONOMIAJ RILATOJ INTER HUNGARUJO KAJ POLUJO

(OKAZE DE SOLENA AKCEPTO DE ADMIRALO NIKOLAO DE HORTHY EN POLUJO).

Kraków, sidejo Almae Matris Jagellonicae, de post komenco de sia historio estis kaj estas centro de fortaj, spiritaj sentoj, kulturaj kaj ekonomiaj, ligantaj Hungarujon kun Polujo. Do tiom pli grandan ĝojon travivis tiu antikva urbo, ke ĝi havis kiel unua la honoron saluti en ĉeesto de plej Eminentaj Mastro kaj Prezidanto de Pola Ŝtato Prof. Ignacy Mościcki, Marŝalo Śmigły-Rydz kaj preskaŭ la tuta pola registaro la Reganton de Hungarlando, Admiralon Nikolaon Horthy.

Grava estis la signifo de geografia situacio de Kraków, dank'al kiu la malnova ĉef-

urbo fariĝis pordego de polaj teroj, malfermita por sudaj kaj okcidentaj landoj. La ĉefa kaŭzo de sinceraj rilatoj inter Arpadoj kaj Piastoj konsistis en la fakto, ke ekzistis bona vojo tra Karpatoj, kondukanta apud Dunajec kaj Poprad, liganta Krakovon kun Hungarujo. De post XIII-a jarcento vigliĝis ankaŭ la politikaj kaj ekonomiaj interrilatoj de Kraków kun Hungarujo. Dum tri jarcentoj Kraków do ĉerpis riĉan profiton grandskale dank'al komercaj rilatoj kun la hungara ŝtato. La objektoj de tiu komerco estis ĉefe drapo, salo kaj kupro. Poste disvolviĝis la ko-

merco kun vino, kaj fama estis la maljuna hungarvino, konservita en krakovaj keleroj. Nun komenciĝis ankaŭ reciproka transloĝiĝo de polaj kaj hungaraj civitanoj.

Dum 150 jaroj estis krakova universitato vera Alma Mater por Hungaroj, ne havantaj propran universitaton. Pruvas tion la tabulo, enmurigita en Jagellona Biblioteko. Ekzistis iam hungara studenta kunloĝantejo ĉe strato Bracka kaj hungara kapelo en preĝejo de Patroj Franciskanoj.

Grandan rolon ludis Kraków en mezepoko por spirita renaskiĝo de Hungarujo dank' al krakovaj presejoj, el kiuj eliris unuaj hungaraj gramatikoj kaj vortaroj. Reciproke Hungarujo helpis al transplantado el Italujo al Kraków de renesanca arto. Poste, malgraŭ joma ŝesado de viglaj interrilatoj, la tradicioj de kunlaboro kaj amikeco renoviĝis en epoko de bataloj por akiri la liberecon sur batalejoj en la jaroj 1848/9 kaj 1863.

Fadeno de l'amikeco inter ambaŭ popoloj, tiriĝanta tra jarcentoj, tra bonfartoj kaj misfortoj fortikiĝis dank'al heroa Komandanto Bem, kies nomo populara „Paĉjo Bem“ fariĝis simbolo de parenca kulturo kaj amikeco inter la du frataj popoloj.

El Wawela kastelo regis super Polujo kaj frata Hungarujo komunaj reĝoj: Ludoviko Andegavena kaj Ladislao Warneńczyk. La regado sur trono de Jagellonoj de princo sepkastellanda, reĝo Stefan Batory, kuniĝis kun gloraj tempoj de pola historio kaj ĝia kulturo.

Ĉiam en malfeliĉaj jaroj de mallibereco polaj naciaj aspiroj kaj bataloj trovis noblan rezonon inter heroaj hungaroj. Multjarcenta amikeco estis ofte sigelata per komune elverŝata sango kaj en vicoj de polaj legioj, kiujn el Kraków gvidis Józef Piłsudski al Venko kaj Libereco troviĝis multaj Hungaroj. Neniam forgesos la pola nacio kaj polaj civitanoj Hungarujon kaj speciale la reganton Horthy, ke li estas la homo, kiu en la momento, kiam Polujo en la jaro 1920 kontraŭ soveta moloh'o per lastaj armiloj batalis, ĉion entreprenis, por helpi al Polujo kaj kiam ĝiaj najbaroj malebligis al Hungaroj la helpon, klopodis kiel eble plej baldaŭ sendi munician materialon kaj tiamaniere plejparte helpi al venko. La kunlaboro de Polujo kaj Hungarujo bazita estas sur komunaj fortostreĉoj, celantaj la konservon de la internacia paco. Do la amikeco pol-hungara havas specialan valoron por plifortigi la interrilatojn en danuba baseno kaj estas tre grava ne nur por Hungarujo kaj Polujo, sed ankaŭ por la tuta Eŭropo.

Tial vaste malfermiĝis antikvaj pordegoj de pramalnova pola ĉefurbo, por saluti la plej eminentajn gastojn.

La vojon de l' reĝoj, la vojon de la plej grandiozaj historiaj faktoj de la pola historio, kondukantan de Barbakano, pramalnova triumfa pordego, kiu jam de post sia komenco, de post la jaro 1499 servis dum festaj akceptoj de grandaj polaj reĝoj), trapasis Rezentanto de la frata hungara nacio, unua Estro de heroa hungara popolo en sendependa Polujo.

La Reganto de la hungara regno loĝis en ĉambraro de la reĝa kastelo, kiu iam estis rezidejo de reĝino Jadviga kaj reĝo Stefan Batory, tiuj grandaj monarĥoj, kiuj el hungara tero Polujon alvenis. Krom granda politika signifo estis tio ankaŭ simbolo de multjaraj tradicioj, kiuj ligis por ĉiam ambaŭ naciojn.

Tial la muroj de antikva Wawel-kastelo, kiuj gastigis la estrojn de ambaŭ ŝtatoj surpris majestatan imponan vestaĵon, indan la glorajn tradiciojn de tiu reĝa rezidejo. Ĉe piedo de Wawel ekstaris giganta, triumfa arkoforma pordego, kiun ornamis polaj kaj hungaraj standardoj kaj ambaŭflanke blazonoj de Hungarlando.

Ambaŭ nacioj, kiuj dank' al simila geografia situo, simila historia misio, kaj granda amo al libereco kaj nacia sendependeco, posedis tiom da komunaj faktoroj, estis destinitaj por komuna interkompreno kaj reciproka varma simpatio. Tial ankaŭ krakova loĝantaro manifestis laŭte siajn tutkorajn sentojn per vortoj: „Eljen“ kaj „Vivu“, kio kreis vere fratan, sinceran atmosferon. Plej klare karakterizas la senĉesan daŭron de niaj komunaj interrilatoj la kortuŝaj vortoj de Marŝalo Piłsudski, elparolitaj siatempe okaze de akcepto de hungara delegacio en Belweder, kiujn ankaŭ citis Prezidanto Mościcki en sia salutparolado dum kortega festeno sur Wawel: „Kaj jen denove venis al ni Hungaraj Sinjoroj“.

LONDONO!

Ni deziras interrilatiĝi kun seriozaj Firmoj por ilia reprezentado en Britujo, eksportado de Britaj komercaĵoj kaj aferoj ĝenerale.

Ĉefaj specialaĵoj:

**METALOJ, MINERALOJ, KARBOJ
ĈIUSPECAJ KRUDAJ MATERIALOJ.
Maklerado. Vendo kaj Aĉetado de Ŝipoj.**

Korespondado:

Esperante, Angle, Hispane, France, k. t. p.

Skribu detale:

**ANGLO - FRENCH & SPANISH
COMMERCIAL UNION, Ltd.,
80, Bishopsgate, London, E. C. 2. Anglujo.
Telegrafadreso: „Anglotrad-London“.**

RAMIRO BLANCO (*Hispanujo*).

LA 'INDULGENCO.

Don Bernardo Caravantes, kanoniko en Sevilla, havis papagon, faman tra la tuta lando, pro eksterordinara parolpovo. Tiam papagon ne konis ankoraŭ Hispanujo. Unu vesperon al la domo de la kanoniko proksimiĝis iu anglo: alta, malgrasa, kun longaj kaj flavaj vangoharoj, vestita en kvadratdesegna kostumo. Li kliniĝis ĝentile kaj diris: Senor canonico, vi havas mirindan papagon, mi dezirus ĝin aĉeti.

— Mi tre bedaŭras, caballero, -- respondis don Bernardo - sed mian papagon mi ne vendos.

— Kial?

— Familia memoraĵo — respondis ĝentile la pastro kaj daŭrigis sian vojon.

Post du tagoj li denove renkontis la anglon; tiun fojon en la urba parko.

— Pardonu, senor canonico, sed mi vere deziras aĉeti vian papagon. Dum du noktoj mi ne povis fermi miajn okulojn, ĉiam nur pensante pri tiu mirinda estaĵo, mi malsaniĝos, se mi ne povos ĝin aĉeti.

— Kaj mi ripetas, caballero, ke mi ĝin ne vendos!

— Kaj se mi pagos la duoblan valoron?

— Vane! Adios, caballero!

La morgaŭan frumateno, apud la enirejo de la katedralo staris la anglo. Ekvidinte la pastron, li proksimiĝis rapide kaj komencis: Senor canonico, mi devas havi la papagon; mi pagos ĉian prezon. Pro ĝi turmentas min terura febro, kaj nur pro ĝi mi restas ankoraŭ en Sevilla.

-- Kaj mi ĝin ne vendos, kaj finite!

Komenciĝis io neimagebla: la anglo senĉese insidis la pastron antaŭ la pordo de lia domo, li sekvadis lin en la preĝejon, li akompanis lin dum la matena promeno, li treniĝis post li kiel ombro. Ĉiutage, kiam don Bernardo volis eliri el la hejmo, li antaŭsendis sian mastrinon donna Brigida por esplori la ĉirkaŭaĵon. Kaj kiam la ŝatinda Brigida revenadis kun anonco, ke la „mal-amiko“, preta al atako, insidas ĉe la plej proksima stratangulo, tiam la tagprogramo de la pastro estis renversita kaj la kanoniko restis en la hejmo-aresto.

Iun tagon - ho teruro - la kruela insulano ekstaris sur la sojlo de la pastra domo kaj deklaris: senor canonico, mi devas havi la papagon, alie mi mortos!

— Je Dio kaj la Madonno, caballero, mi ĝin ne vendos! ekkriis don Bernardo kaj fermis la pordon.

La sekvantan mateno, kiam donna Brigida levis la fenestro-kurtenon, jen kion ŝi ekvidis: en la fenestro de la najbara domo,

vid-al-vide de la pastra pordo, brilis la flavaj vangoharoj de la malgrasega anglo.

Don Bernardo ekĝemis mallaŭte, li rapide pakis siajn kofrojn, kaj fuĝis al Barcelono.

Sed imagu, kiu atendis lin ĉe la stacidomo de la Kataluna ĉefurbo?

Estis la anglo!

— Well, senor canonico, mi volas kaj mi devas aĉeti la papagon. Kvazaŭ persekutita de ĥolero, forkuris don Bernardo el Barcelono, revenis hejmen kaj tute malsana li enlitiĝis, delirante pro febro. Al li ŝajnis, ke la anglo kun papaga kapo promenas sur lia brusto, terure kriegante en la lingvo de Shakespeare.

Ĉiutage venadis al la pastro leteroj kaj telegramoj, entenantaj nur unusolan frazon: „Mi volas aĉeti la papagon.“

Fine la kompatinda pastro ne eltenis; li prenis sian fenomenan birdon, donis ĝin al la anglo kaj diris: Prenu ĝin, caballero, prenu ĝin, alie mi freneziĝos! Nenion mi postulas pro ĝi, mi deziregas sole, ke vi malaperu de antaŭ miaj okuloj por ĉiam! Adios caballero!

La anglo foriris kun kontenta mieno. Neniam revidis lin don Bernardo. La pastro reakiris la kvieton, tute trankviliĝis kaj denove povis komenci normalan vivon.

Pasis unu jaro.. Iun tagon venis al la pastro por indulgenco, juna kaj bela knabino kun grandaj kaj ploregantaj okuloj. Ŝi estis filino de konata kaj estimata familio, ŝi estis bone kaj pie edukita, ŝi eĉ spirite ne devojiĝis de la virteca vojo. Multaj elegantaj kaj simpatiaj knaboj vane klopodis altiri ŝian atenton. Kaj jen, fine aperis homo, nek juna, nek bela kaj nek simpatia kaj ŝi sukcesis delogi la pian knabinon en pekan vojon.. Ĝi estis io terura kaj neniel komprenebla.

— Filino mia, — ekkriis don Bernardo, taŭzante sian nigran hararon -- kiel ci povis! Ci, tiel virteca, tiom pura, tiom saĝa!...

— Oh, patro — interrompis la ĉarma pekulino — se vi scius kiel li min persekutis... En ĉiu loko, en ĉiu tempo, en la preĝejo, en la strato, en la teatro... Kien mi turnis la okulojn insidis tiu altkreska, malgrasa kaj flavhara longpiedulo...

— O Dio, o ĉielo kompatema — ekkriis la indulgencanto -- ĉu li estis anglo?

Jes, patro, anglo, li havis... papagon...

S-u-f-i-ĉ-a-s! -- mallaŭte flustris la pastro -- la homa eltenebleco havas difinitajn limojn... Gardu nin Dio kontraŭ li kaj similaj al tiu... Ego te absolvo, ego te absolvo... Mi indulgencas vin!...

Trad. Henriko Gielb.

XXX-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO.

LONDON, 30 JULIO — 6 AŬGUSTO 1938.

Oficiala Informilo N-ro 3.

Adreso por leteroj. — Sekretario, 30a Universala Kongreso de Esperanto, Herons-gate, Rickmansworth (Herts), Anglujo.

Kongresejo. — University College, Universitato de Londono.

Kotizoj. — Ĝis 31-3-38, £1-5-0; post 31-3-38, £1-10-0. La edzo aŭ edzino de kongresano, kaj gejunuloj ne pli ol 20-jaraj, pagas la duonon de ĉi tiuj sumoj. Estas oportune sendi kotizojn en registrita letero per britaj ŝtataj monbiletoj, haveblaj ĉe bankoj kaj monŝanĝejoj en multaj urboj. Se oni sendas pagojn per poŝtmandatoj, oni ĉiam sendu samtempe informon pri la **nomo kaj adreso de la sendinto** kaj la celo de la pago, ĉar la brita poŝtadministracio ne skribas mesaĝojn sur poŝtmandatoj. La poŝtĉekonta sistemo ne ekzistas en Britujo. Ĉekoj kaj aliaj pagiloj estu pageblaj al Internacia Esperanto-Ligo.

Loĝejoj kaj Ekskursoj. -- Ĉiu kongresano devas plenigi mendilon por loĝejoj kaj ekskursoj kaj sendi ĝin al la kongresa oficejo kiel eble plej frue, kun la koncerna pago. La komitato ne povas garantii ion al kongresano, kiu ne zorge plenumas la kondiĉojn.

Donacoj. — La Organiza Komitato volonte ricevos donacojn por helpi al la plena sukceso de la Kongreso. Donacoj jam ricevitaj £20. 17ŝ. 3p.

Blindula Kaso. — La Organiza Komitato volonte ricevos donacojn por ebligi, ke blinduloj partoprenu la Kongreson. Jam ricevita £20. 1ŝ. 2p.

Presaĵoj. -- En la kongresejo kaj kongresaj kunvenoj oni rajtos disdoni cirkuletojn kaj ĉiajn aliajn presaĵojn nur post antaŭa aprobo de la kongresa komitato.

Dokumentaro. — La sama postulo rilatas al presaĵoj disdonotaj kun la oficialaj kongresdokumentoj; tio estas, ili devos ricevi la antaŭan aprobon de la komitato kaj devos alveni ĉe adreso indikota, plej malfrue du semajnojn antaŭ la kongreso.

Fakaj kunvenoj. — Organizontoj bonvolu anonci frue siajn dezirojn. Jam anoncitaj

estas kunvenoj de Skolta Esperantista Ligo, T. A. G. E., Katolikoj.

Karavanoj estas jam aranĝataj el diversaj landoj.

Taksistoj, kiuj intencas ĉeesti la kongreson, estas petataj sendi poŝtkarton al la Sekretario, Londona taksiista Grupo, 269 Grays Inn Road, London W. C. 1.

Ostendo. -- Loka grupo proponas sian helpon al kongresanoj, kiuj transiros tiun urbon. Adreso: Ostenda Grupo Esperantista, Torhoutsche steenweg 150.

Membraro. — Ĝis la 16-2-1938 aliĝis al la kongreso 941 el 25 landoj.

POSTKONGRESAJ ARANĜOJ

Krom tiuj, kiujn ni jam anoncis, la OKK aranĝas la sekvantajn:

C. Bicikla rondvojaĝo tra la suda parto de Anglujo — de la 7a de aŭgusto ĝis la 11a. Ĝi komenciĝos kaj finiĝos en Londono. Taga distanco proks. 70 km. Tuta kosto ne pli ol 50 ŝilingoj. Aliĝantoj indiku, ĉu ili estas membroj de iu junulgasteja asocio.

D. Tendaro apud Ipswich, orienta Anglujo, de la 7a de aŭgusto ĝis la 13a por gejunuloj 14-24 jaraj. Kosto proks. £1, por ĉio krom la veturkosto de Londono kaj krom lanko vriloj, kiujn oni kunportu mem. La prezo de ir-revena fervoja bileto de Londono ne superos 12½ ŝilingojn.

Por la Organiza Komitato
Cecil C. GOLDSMITH.

Sekretario.

* * *

Preparaj laboroj bone prosperas. Aliĝis ĝis nun preskaŭ 1000 personoj el pli ol dudek landoj. Kotizo kongresa ĝis 1-a aprilo estas 33 zł, poste 40 zł pageblaj al ĉefdelegito de IEL (inĝ. M. Chmieliński, Toruń Krasin-skiego 4), kiu ankaŭ liveras aliĝilojn, kongresafiŝojn, glumarkojn. Fiksita estas provizora programo. Malfermo okazos en University College. Nombro de ricevitaj ĝis nun aliĝiloj esperigas pri la sukceso. Pliaj detaloj sekvos.

DANKO.

Al ĉiuj, kiuj pro la terura sortobato rapidis konsoli min kaj sendis vortojn de kunsento, mi dankas tutkore.

Tad. Hodakowski.

KOMUNIKO DE P. E. D.

ĜENERALA KUNVENO DE P. E. D.

La nunjara Ĝenerala Kunveno de P. E. D. okazos en junio k. j. dum la „Krakovaj Tagoj“. Tagordon, precizan daton kaj aliajn detalojn ni komunikos en la aprila n-o de „Pola Esperantisto“.

Samtempe ni atentigas, ke laŭ art. 10 § 2 de la statuto de P. E. D. membroj, kiuj ne pagis la kotizon, ne rajtas voĉdoni.

„KVINMIL — FONDO“.

Pluaj pagoj por la „Kvinmil - Fondo“:

Inĝ. Dro Emilian Loth, Łódź	20 zł
Prof. Włodzimierz Olszowski, Poznań	20 „
Apelacia Juĝisto St. Dobrzański, Lublin	5 „
Mgr Czesław Pruski, Lublin	2 „
St. kaj Olga Stefaniak, Lublin	1 „
St. Bekiesza, Lublin	1 „

* * *

Jam nun realiĝis por 1938 jaro granda parto de membroj. Novaj membroj aliĝas kaj kreskas reto de delegitoj. Jam nun nombro de polaj IEL-anoj proksimumas al tiu en mezo

de la pasinta jaro. Mi esperas do, ke dum la nuna jaro nia nombro devas almenaŭ triobliĝi kompare kun la pasinta jaro. Kun kontenteco mi devas konstati, ke iom post iom malaperas hezitemo kaj sindetenemo de polaj esperantistoj. Al tiuj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis aŭ ne realiĝis, mi rekomendas plej baldaŭan aliĝon, ĉar poste oni ne plu liveros al nealiĝintoj Heroldon de Esperanto kaj Esperanton Internacian. Precipe mi rekomendas aliĝi tuj al tiuj aliĝemuloj, kiuj dezirus esti delegitoj, vicdelegitoj aŭ fakdelegitoj en lokoj, kie tiuj ĉi ankoraŭ ne ekzistas, ĉar alie ili ne povos esti lokitaj en jarlibro por 1938, por kiu mi devas plej baldaŭ sendi materialon. Dezirantoj petu respondilojn (delegitajn, vicdelegitajn, fakdelegitajn) sendante samtempe kotizojn, laŭ mia adreso, kiuj estas: membro kun jarlibro - 5 zł, membro abonanta monatan organon - 12 zł 50 gr, membro abonanta Heroldon (semajna) - 25 zł, membro subtenanto ricevanta monatan organon kaj premion - 30 zł.

inĝ. M. Chmieliński

ĉefdelegito (Toruń, Krasińskiego 4)

BIBLIOGRAFI O.

VERMLANDO. Turistbroŝuro pri „la provinco de Gösta Berling“, Svedlando.

Eldonis: **Esperanta Turista Komisiono, TEGELBACKEN, STOCKHOLM.** Formato 20x14 cm., 32 paĝoj. **Prezo:** 1 respondkuponon.

TRA LA GAZETARO.

LA SUDA KRUCO; Ofic. Org. de la Aŭstralazia Esp. As. Red. Melbourne, Aŭstralio. Reginald Banham F. B. E. A. 2 Banchory str. Essendon W. 5. Abonprezo 4 sh. 6 pencoj.

Ni ĉerpas el ĝi (laŭ la Heroldo):

26 de oktobro la prezidanto de la Franca Resp. S-ro Doumer dum la bankedo demandis sron A. Baudet, konatan prezidanton de la Franca Komerca Ĉambro, ĉu li povas nomi al li la lingvon kompreneblan por ĉiuj alinacianoj. En tiu ĉi momento ekstaris sro Faraker, aŭstralia delegito, kaj ili ambaŭ vigle kaj lerte interparoladis esperante.

HELENA ESPERANTISTO. Red. Anakreon Stamatiadis. Str. Rodou. Athenai. Hellas. Interesaj informoj pri la lando.. Unuaj loĝantoj de Makedonio kaj de Thrako estis Pelasgoj de Aria raso kaj de Azia deveno. Estis kelkaj gentoj. Poste alvenis Helenoj de sama deveno. La lastaj invadis tutan

Helenujon ĉirkaŭ 2500 — 2000 a. K. El ili iĝis gentoj: Aioloj, Dorioj, Ahajoj kaj Ionoj, kiuj iom post iom disvastiĝis sur la tutan landon. Ni ne povas ĉi tie preparoli tutan interesan rakonton, sed ĉiu esperantisto devas iom pli detale ekkoni ĝin.

INFORMATION MEDICALE. Red. Rue St. Etienne. Lille-Nord. France. Februaro. Diversaj kuracmetodoj kaj kuraciloj.

AMERIKA ESPERANTISTO. Februaro. Centra Ofic. 1517 H. Street N. Washington. J. R. Scherer. S-ino Dave Hennen Morris parolis ĉe Klubo de Virinoj Universitataj en Washington pri estonta internacia lingvo. La ĉeestintoj kun granda aplaŭdo akceptis la proponon de prelegintino por Esperanto. Usona Esp.-movado, malforta dum kelkaj jaroj nun marŝas antaŭen, kaj oni esperas ke dum mallonga tempo estas atingebla cifero de mil membroj.

BRITA ESPERANTISTO. Org. de Brit. As. Marto. Kursoj de F-ino Saxl bone prosperas. Estas multaj Londonanoj, kiuj estas varbitaj por Cseh kursoj. El la raporto oni povas vidi, ke la As. kreskas. Jam estas delegitoj en 43 urboj. En Londono ok societoj.

HEROLDO DE ESPERANTO. Eldon. **Belga Esp. - Instituto.** Antwerpeno. Red. **Teo Jung**, Adr. Harstenhoegweg 223. Scheveningen, Nederlando.

Alvoko de Prez. Generalo Bastien al komuna laboro. Listo de kongresanoj kreskis jam ĝis 950 personoj el 25 landoj. Estas

rimarkinda tiom granda nombro. La venonta Kongreso en Londono promesas iĝi impona!

L'ESPERANTO. Periodico di informazioni e commenti. Milano. Galleria Vittorio Emanuele 42. Priparolata Esp. movado en 26 landoj. Ĉie oni rimarkas kreskon de nia afero. O. B.

SKOLTA ANGULO.

(Red.: Józef Toczyski, Lwów)

S. E. L. La plej grava por la skolt-esperanta afero estas disvolvo de S. E. L. Kun ĝojo ni povas do sciigi, ke S. E. L. - afero en Polujo nune estas sur la plej bona vojo. Ĉefa Skolta Estraro estas sufiĉe favora por esperantaj aferoj, kaj eĉ nomis polan nacian agenton de SEL — referenton de skolt-esperantaj aferoj ĉe Eksterlanda Fakto de Ĉefa Tendaro. En kelkaj urboj okazas nune kursoj esperantaj por skoltoj (Warszawa, Wronki, Łódź, Lwów, Rydułtowy, Gdynia, Bydgoszcz), kaj multaj lernas E-on kiel soluloj.

Skaut unua pola skolt-ĵurnalo, ĉiam tre favora por Esperanto, aperigis pri prof. dr O. Bujwid kaj lia 80-jara naskiĝdatreveno artikolon en Esperanto. (Postulu la specimenumeron de Redaktejo: Skaut - Lwów - Kurkova 12).

Nunjara Tendaro de S. E. L. (Laŭ Tendara Bulteno No 1) Tendaro nunjare okazos sen tendoj — ĉar ĝi okazos **dum la Kongreso en Londono.** La Prepara Komitato trovis lokon, dank' al afableco de Pastro George Moore, en truĵejo de fama londona skolt-trupo „The Lord Mayor's Own“. La tendaro daŭros de 30 julio ĝis 6 aŭgusto. Tuj apud

la truĵejo troviĝas multaj famaj kaj historiaj konstruaĵoj - do vizitado de ili por tendaranoj ne estos laciga.

La lito kun matenmanĝo kostos sep anglajn ŝilingojn por la tuta semajno (ĉirkaŭ 13 zł). Aliaj manĝaĵoj kostos ĉirkaŭ 20 ĝis 25 ŝilingoj por sep tagoj, do entute unusemajna restado en Londono kostos 30 ŝilingojn (ĉirkaŭ 40 zł).

SEL — kunveno okazos 1-an de aŭgusto je 14³⁰ kiel parto de Universala Kongreso. Tiun kunvenon povos partopreni ĉiu SEL-ano senpage (do eĉ ne-kongresanoj).

Por tiuj, kiuj povos resti en Anglujo post la kongreso, SEL aranĝos skolt - tendaron apud Ipswich en tendoj.

Kostoj - 20 ŝilingoj (26 zł).

Atentu skoltinoj!

Oni petis pri la aranĝo de simila ejo por skoltinoj - kaj skoltina ĉef-agentino jam serĉas taŭgan lokon. Pli precizajn informojn ni donos poste.

Geskoltoj - venu al Anglujo - la lulilo de skoltismo! Atendas vin varmkora bonvenigo.

Adreso de sekretario de la Prepara Komitato de SEL-tendaro:

„Tantallon“, The Meadows, Farnborough, Kent - Anglujo.

R A D I O.

INTERNACIA RADIO-SERVO.

Tre estimataj radioparolantoj, kursgvidantoj de la sendstacioj, Landaj Asocioj kaj unuopaj samideanoj.

Kiel vi certe scias, ni estas komisiitaj de la Internacia Esperanto-Ligo kompili kaj publikigi ĉiumonate informojn kaj ĉiujare statistikon pri la Esperanto-dissendoj tutmondaj. Pro tio ni hodiaŭ turnas nin al vi kun la peto ke vi, kiel eble plej baldaŭ kaj almenaŭ antaŭ la 15-a ĉiumonate, sendu informojn al ni pri la Esperanto-dissendoj dum la proksima monato.

Ĉar ni, pere de kunlaborantojn multaj landoj, publikigas informojn pri la Esperan-

to-dissendoj en ĉiutagaj, fakaj, kaj Esperantaj gazetoj, vi certe komprenas la gravecon regule kaj ĝustatempe informi nin pri la dissendoj el via loka aŭ landa Radio-stacio. Ni substrekas, ke dependas de vi, ĉu nia programo enhavos fidindajn informojn pri la Esperanto-dissendoj tutmondaj.

Ni esperas, ke estas eble en tiu ĉi jaro, sur la fundo de la faritaj spertoj kaj per helpo de niaj kunlaborantoj, malnovaj kaj novaj, pligrandigi la sukcesojn kaj servi tiel al nia movado kaj al grava progreso de l' homaro, ĉu Radio, ĉu Esperanto.

Atingi ĉi tiun celon nur estos eble per komuna kunlaborado de multaj laboremaj gesamideanoj tutmondaj. Al ĉiuj, kiuj sub-

tenis nin en la lasta jaro, ni diras ankaŭ per tiuj ĉi linioj nian plej koran dankon.

Ni estas certaj, ke ĉiuj ankaŭ en estonteco aubtenos nian laboron. Same ni esperas, ke ĉiuj, kiuj ĝis nun staris flanke de niaj penadoj, trovos ankaŭ la vojon al ni por helpi al nia fincelo:

Esperanto kiel Radio-Lingvo!

Internacia Radio-Servo.
Helsingborg 3, Svedujo
Gustav Henriksson, Prez.

PETO AL AŬSKULTANTOJ DE ESPERANTAJ DISAŬDIGOJ.

Jam pli ol dek jarojn estona radiostacio en Tallinn dissendis ankaŭ Esperantajn informojn. Sed ĝi estis malforta kaj tial aŭdebla nur al apudestantaj najbaraj landoj. En fino de pasinta jaro komencis funkcii en Tŭri, en la mezo de la lando, nova 50-kilovata stacio. Estus interese ekscii pri la vasteco de ĝia aŭdeblo. Tial mi petas alilandan aŭskultantojn sciigi al mi per poŝtkarto pri ĝia aŭdebleco. En negravaj lokoj, kies situo eble ne estas ĉe ni konata, estus necese noti ankaŭ iun urbon, kiu estas proksima al tiu loko. Notu ankaŭ, kiom da valvoj havos via aparato. La ondo de Tŭri estas 410 m. En radio-programoj de aliaj landoj ĝi verŝajne estas menciita sub nomo Tallinn. Ĉar mi transdonos la informojn al la stacio, mi esperas, ke vi ne malatentos mian peton. Tiuj informoj ja ankoraŭ plifirmigos la opinion de l'gvidantoj de la stacio pri la neceso de Esperanto-disaŭdigoj. — Mia adreso:

J. Vahtra, Koidu 26-2, Tallinn, Estonio.

★ ★ ★

REGULAJ DISSENDOJ

Horindiko laŭ MET.

Dimanĉe:

10.10—10.25 h. Kortrijk (204 m): Esperanta kroniko.

Lunde:

18.20—18.30 h. Suisse Romande (443m): Esper. Kurso.

21.30—23.00 h. PRE 2 Vera Cruz (1460 m): Kurso, kantoj, informoj.

22.10 h. (proksimume) Roma II (245 m) kaj 2 RO (31.13 m): Esp. konversacioj.

Marde:

18.00—18.15 h. Mor. Ostrava (269 m): Parolado.

19.20—19.40 h. Hilversum KRO (1875 m): Kurso.

21.20—21.35 h. Kaunas (1935 m) kaj Klaipeda (531 m): „Nia anguleto“.

22.00—22.10 h. Tallinn (410 m) kaj Tartu (579 m): Informoj pri la estona vivo.

23.30—23.45 h. PRF 5 Rio de Janeiro (31.58 m) kaj PRF 2 (780 m): Oficialaj informoj kaj kantoj.

Merkrede:

15.00—15.20 h. Paris PTT (431 m); Elementa kurso.

21.00—21.30 h. LT 1 Rosario (384 m): Kroniko.

Vendrede:

21.30—22.00 h. PRE 2 Vera Cruz (katolika stacio 1460 m): Informoj kaj kurso,

Sabate:

10.30—?? h. 7 HO Hobart: Esp. kroniko.

14.45—15.00 h. Lille (247 m): Esp. kroniko kaj kurso.

17.15—17.30 h. Loksbergen-Limburg (202 m): Esp. kvaronhoro.

19.00—19.15 h. Roma I (420 m) kaj 2 RO (31.13 m): Turisma kroniko.

22.25—22.40 h. PRF 3 Sao Paulo (960 m): Informoj pri Esp.-movado, parolado.

ALIAJ DISSENDOJ

Italaj turismaj kronikoj en Esperanto.

Radio-stacio Roma I (420 m) kaj 2 RO (21.3 m) disaŭdigas regule ĉiusabate je 19 h. paroladojn pri la turismaj belaĵoj en Italujo. Oni povas peti la tekstojn de la prelegoj ĉe Direz. Gen. per il Turismo, Via Vittorio Veneto 62 ROMA.

* * *

Ĝojiga informo! Ĝis fino de januaro partoprenis en la IV Itala Radio-Konkurso 1115 Esperantistoj. Ni gajnis do la unuan lokon inter la aŭskultantoj!

La lotumado de la premioj de la IV Itala Radio-Konkurso okazos antaŭ la mikrofono de la radio-stacioj Roma I (420 m) kaj 2 RO la 31 III 1938 je 19 h.

Esperantlingvaj teatro-dissendoj el Paris.

Radio-amatoroj! Samideanoj! Aŭskultu kaj poste skribu al: Esperantaj Radio-dissendoj, Courrier der Auditeurs, 107 rue de Grenelle, Paris 7.

21 III Radio Paris je 24.00 h: „La formikoj“ unuakta komedio de H. Jeanson. trad. M. Darnault, kaj „Nokta ekspedicio“ skeĉo de Tr. Bernard, trad. Rollet de l'Isle. Reĝis. M. Darnault, prez. Jacques Manceau.

28 III Paris PTT je 23.45 h: „S-ro Le Trouhadec delogita de l'diboĉo“ de Jules Romains, trad. Roger Bernard. Reĝis. M. Darnault, prez. R. Bernard.

Radio-stacio Mor. Ostrava.

22 III je 18.00—18.15 h prelego de Prof. D-ro Neubauer: Ŝtato nacia kaj nacieco.

29 III je 18.00—18.15 h prelego: Esperanto en moderna vivo (III. Sciencoj puraj kaj aplikataj).

Mallonga stacio Praha.

ondlongo 31.41 m

19 IV je 22.05—22.30 h. *Esperanto - Horreto.*

Radio-stacio Hilversum.

(NCRV = kristana; 1875 m kaj 415.5 m)

7 IV je 19.25—19.40 h. prelego de s-ro L. Woudenberg: Studo kaj uzo de Esperanto.

Radio-stacio Varna (Bulgarujo).

(235 m)

22 III je 11.30—11.45 h prelego de s-ro Georgi Hr. Dimov: Goethe kaj la muziko.

Irlandaj radio-stacioj:

Athlone	(531 metroj)	
Dublin	(223 „)	relajso
Cork	(242 „)	„

disaŭdigas ĉiumonate - la unuan dimanĉon de la monato je 19.15—19.30 h. (M. E. T.) esper. prelegojn. Nepre aŭskultu kaj sendu gratulleterojn al **Radio-Stacio en Dublin.** De via subtenado dependas la sorto de la prelegoj!

* * *

RADIOAŬSKULTANTOJ-ESPERANTISTOJ! Abonu la Internacian S.O.S. Bultenon, donantan al vi ĉiumonate programon de Esp. radioprelegoj de tuta mondo! Jar-abono 9 fr. fr. Adreso: Radio Club Espérantiste de France, Paris 16 e. 26, Avenue Dode de la Brunerie.

KATOLIKA ESPERANTO MOVADO.**ESTIMATOJ.**

Kun ĝojo kaj kun frata amo ni invitas vin ĉiujn, el ĉiu direkto de la terglobo.

Venu por partopreni la solenaĵojn de nia duoble sankta jaro! Venu al Budapeŝt kaj vizitu la Eŭkaristian Kongreson! Ni ĝoju kune!

Domaĝe nia ĝojo ne estas senmanka. Malserenigas ĝin la zorgo, kiel ni komprenos unu la alian. Nian hungaran lingvon vi ja ne parolas. El inter la viaj ni konas nur apenaŭ kelkajn kaj la tempo jam ne sufiĉas por lerni nek la nian, nek la viajn.

Tamen ni ne volas, ke ni nur interrigardu unu la alian senkomprene, sed ni volas babiladi kun vi ĉiuj, senpere kaj amike.

Ni devas do kapti la rimedon, kiu ebligas ĉi tion, ni devas preni je helpo la lingvon esperanto.

Ni havas ankoraŭ kelkajn monatojn kaj tiuj sufiĉas por ellerni ĝin. Tiuj sufiĉas, ke kiam vi alvenos, ni povu jam interparoladi kvazaŭ ni estus samlingvanoj.

Karaj Gefratoj! Ni lernas jam amase esperanton. Alvoku viajn samlandanojn, ke ili lernu ĝin amase! Diskononigu per viaj naciaj gazetoj, per viaj radiostacioj, ke dum la kongreso ĉiu povos bone interkompreniĝi per esperanto; do se ankaŭ vi amase ellernos la lingvon esperanto, tiam anstataŭ la lingva ĥaoso, timata, regos ĝenerala interkompreno kaj anstataŭ la muta interrigardo kaj ridinda gestado, aŭdiĝos familiara babilado.

Kiel vi jam legis en nia gazetaro, la pre-

para Komitato de la Eŭkaristia Kongreso akceptis oficiale ankaŭ esperanton kaj presigis la eŭkaristian broŝuron ankaŭ esperantlingve. Samtempe plej ĝentile ni petas vin, bonvolu sciigi, kiom da broŝuroj vi bezonas por disdono.

Vian baldaŭan respondon atendente, ni anticipe dankas pro via penado.

Kun samideana saluto:

Hungarlanda Katolika Esperanto Societo

KARAJ SAMKREDANOJ!

Vi jam nepre scias, ke la 34 Internacia Eŭkaristia Kongreso oficiale akceptis Esperanton por helplingvo.

Tamen ĝia uzado estas sufiĉe limigita. Krom nia I-a Eukaristia Esperanto Mondkunveno, ni rajtas ĝin uzi nur dum la unua ĉefkunveno, okaze de la salutparoladoj, la 26-an de majo.

Dum la aliaj publikaj kunsidoj, la hungarlingvaj paroladoj estos tradukitaj nur en la italan, francan kaj germanan lingvojn, sed en Esperanton ne.

Karaj Samkredanoj! Estas vere, ke en ĉiun lingvon ne povas okazi la tradukado, tamen la principo de egaleco postulas, ke 1) aŭ nenia tradukado okazu, 2) aŭ okazu la tradukado en la neŭtralan lingvon Esperanto, 3) aŭ tamen okazu la tradukado en ĉiun lingvon de la partoprenantoj.

Emfaze do ni petas vin, bonvolu en tiu ĉi senco skribi leterojn al la „Eucharisztikus

Kongressus Elökészitő bizottság“, Budapest. Ferencesek tere, kaj per ĉiuj rimedoj instigi viajn samlandanojn, ke ankaŭ ili skribu urĝe kaj amase! La leteroj estu **nepre nacilingvaj!**

Ni salutas vin en Kristo:

Hungarlanda Katolika Esperanto Societo.

Budapest. Geza - u. 4

NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO.

LONDONA GRANDMAGAZENO ENKONDUKAS ESPERANTON.

Ĉiu vizitanto al Londono konas almenaŭ la imponan eksteraĵon de ties plej grandioza magazeno, la ĉiam entreprenema SELFRIDGE, kie oni povas aĉeti cent diversajn specojn de preskaŭ ĉio; kaj el tiuj vizitantoj multaj certe kun intereso penetras en la labirintajn fakojn de tiu ĉi kolosa magazeno, kiu, laŭ sia propra fiero kaj eble ĝusta aserto, estas la civita centro de Londono.

Gravan signifon por nia movado, do, havas la fakto ke la direktoraro de Selfridge ĵus inaŭguris du Cseh-metodajn kursojn por elektitaj reprezentantoj de sia personaro. En tiuj ĉi unuaj du kursoj, kiuj okazas dum laborhoroj en la magazeno mem, partoprenas 32 personoj — gevendistoj, interpretistoj, telefonistinoj, kelkaj fakestroj, ktp. Ambaŭ kursojn gvidas Cseh-metoda instruistino Margarete Saxl, kaj apenaŭ necesas aldoni, do, ke ĉiu lernanto estas jam maksimume entuziasma pri nia lingvo!

PREZIDANTO DE ROTARY INTERNATIONAL SRO MAURICE DUPERREY, FERVORA ESPERANTISTO.

Polaj Rotary-kluboĵoj gastigis en Warszawa la 12 kaj 13 de marto sinjoron Duperrey, prezidanton de Rotary International, okaze de lia vojaĝo, por viziti ĉiujn Rotary-kluboĵojn en Eŭropo. Ni ja scias, ke Rotary estas unu el plej potencaj organizaĵoj en la mondo, kiu nombras jam nun, post dudekkvin-jara ekzistado, ĉirkaŭ 250.000 da anoj kaj pli ol 400 klubojn. Tiu ĉi potenca organizo uzas 16 lingvojn parolatajn, ankaŭ esperanton. Sed la lasta estas nur malofte uzata dum interparolado. Precipe oni uzas anglan, francan kaj italan eĉ portugalan lingvojn. Ofte germanan. Dum la restado de s-ro Duperrey en Varŝava mi povis interparoli kun li esperante kaj konstati, ke li estas tre bonvolema al uzado de esperanto dum internaciaj konferencoj kaj kongresoj.

Li konas bone ĉiujn francajn samideanojn kaj estas kun ili en ĉiama kontakto. Dum

EŬKARISTIA KONGRESO.

Ni hungaraj esperantistaj fervojistoj petas ĉiujn eksterlandajn fervojistojn, kiuj vojaĝos al Budapest okaze de la Eŭkaristia Kongreso, ke pri sia alveno estu afablaj urĝe sciigi: Teodoro Kovács p. fervojoficisto, Budapest VII, Hernád u. 6, I, 10.

la bankedo festita je la honoro de nia gasto ĉeestis kaj parolis esperante ankaŭ sroj frattoj prof E. kaj J. Lot konataj samideanoj kaj prezidinto de nia Jubilea s-ro Wyszyński.

O. Bujwid.

HELPOKORO EL SUD-AFRIKO.

Ĝis nun en nia sunluma Sud-Afriko preskaŭ nenio estas publikigita pri Esperanto. Ne ekzistas Esperanto-movado, kaj estas nur du aŭ tri delegitoj. La estonteco por nia lingvo ŝajnas tre malesperiga. Ĉu ne estas eble plibonigi la situacion?

Antaŭ tri monatoj mi decidis labori por plivastigi nian lingvon. Mi verkis du artikolojn, unu anglalingvan, la alian sudafrikalingvan. Vi devas scii, ke Sud-Afriko estas dulingva lando aŭ, pli ĝuste, multlingva, ĉar estas diversaj indiĝenaj lingvoj. Antaŭ tricent jaroj parto de la lando estis nederlanda posedaĵo, kaj enkondukiĝis la nederlanda lingvo. Multaj francaj rifuĝintoj ankaŭ trovis tie novan patrujon. De pli ol unu jarcento Anglujo estis la mastro en Sud-Afriko, ĝis la jaro 1910, kiam fondiĝis la Unio de Sud-Afriko, kaj la ligiloj kun Anglujo pli malpli liberiĝis. La sudafrika lingvo similas al la nederlanda simile kiel la flandra lingvo en Belgujo.

Mi skribis do la du artikolojn, kun malsukceso. La anglalingvaj gazetoj ne volas akcepti novaĵojn pri Esperanto; sed tiujn malprogresulojn ni venkos. Pri la sudafrikalingvaj gazetoj okazis pli da sukceso, kaj tri redaktoroj jam akceptis, aŭ promesis konsideri artikolojn pri nia lingvo.

Sed mi urĝe bezonas pli multajn armilojn por daŭrigi kaj venki la batalon! Tial mi petas la tutmondan esperantistaron sendi al mi ĉian materialon, kiun ili havas disponebla-gazetojn, jarlibrojn, propagandaĵojn, leterojn, fotografiaĵojn ktp. — por ebligi al mi la aranĝon de ekspozicioj.

Helpu fondi esperantistan kernon en Sud-Afriko!

J. Semmelink, Membro de IEL,
c/o A.C.K.I., Postbox 1246, Pretoria
(Transvaal), Sud-Afri

LA X-a NEDERLANDA ESPERANTO-KONGRESO

okazos la 16 — 18 de Aprilo 1938 en Amsterdam.

Sendu salutleterojn!

GRATULU!

En n-ro 2 de „Pola Esper.“ ni raportis pri la enkonduko de Esperanto en la propagand-programon de Federacio Spirita Brazila. Tiu respektinta Federacio alprenis Esperanton ne por uzi ĝin tuj kiel propagandilon de aliaj kulturidealoj, sed por ĝin propagandi kune kun aliaj homidealoj, ĉar ĝia programo ne estas ricevi servojn, sed fari servojn. Do, de nun la Federacio laboras por Esperanto, por ke tiu ĉi ligvo servu al la homaro. Estas konsilinde, ke ĉiu esperantisto sendu gratuleteron aŭ poŝtkarton, gratulante la estraron de tiu ĉi asocio kaj ĝin kuraĝigante al plua laborado. Ĉiu gratulanto nepre ricevos interesan dokumenton por sia propra propagando kiel respondon. Ĝia adreso estas: Federação Espirita Brasileira, Av. Passos 28/32, Rio-de-Janeiro, Brazilo.

INTERNACIA JUNULARKUNVENO en NEDERLANDO.

La redakcio de „La Juna Vivo“, en kunlaboro kun „La Norda Stelo“, Esperanto-organizo en Nord-Holando, organizas junularkunvenon en-Groet (komunumo Schoor).

Povas partopreni gejunuloj de 12 ĝis 18-jaroj, kiuj sufiĉe bone parolas esperanton.

Anoncis sin jam pli ol 70 gejunuloj el Francujo kaj Anglujo, kaj plej verŝajne venos ankaŭ infanoj el aliaj landoj. El Nederlando kompreneble multaj partoprenos.

La kostoj estas kiel eble plej malaltaj: Nederlando pagas nur 7.50 guldenojn (20 zł), alilandanoj 3.50 guldenojn (10 zł).

La kunveno daŭras unu semajnon (10-17 aŭgusto).

La komunumo de Schoorl senpage disponigis lernejon, kies ĉambroj estos uzataj kiel dormejoj. — Oni tagmanĝos en junulardomo.

INTERNACIA ENKETO LERNEJA.

La Bulgara Ministerio por Komercio kaj Industrio, per cirkulero No v. 736113 de la 8-a de aprilo 1937 enkondukis Esperanton, kiel nedevigan lernobjekton en la komercajn lernejojn de nia lando.

Post kelkaj monatoj, en la programo de la bulgaraj komercaj lernejoj estas farotaj gravaj ŝanĝoj. Por ke ni -- la esperantistoj, helpu la Ministerion en tiu ĉi tre grava paŝo, ni petas vin, kiel eble plej baldaŭ respondi je la subdonitaj demandoj.

Enketanto: Georgi ĤR. Dimov, ĵurnalisto. Bul. Dobriĉ No 18, Varna, Bulgarujo.

Demandaro.

1. Kiaspecaj komercaj lernejoj ekzistas en via lando?
2. Kiom da jaroj daŭras la studado en ili?
3. Kia antaŭa preparado estas postulata de la kandidatoj por la lernejoj?
4. Kiom da horoj semajne daŭras la studado?
5. Kiaj objektoj estas instruataj en la diversaj klasoj (programo)?
6. Kiom da horoj semajne por ĉiu lernobjekto?
7. Kiamaniere oni difinas la sukceson de la lernantoj?
8. Disciplino kaj ĝiaj rimedoj: a) premioj, b) punoj
9. Nombro de la lernantoj en unu klaso?
10. Rajtoj kaj devoj de la direktoro?
11. Rajtoj kaj devoj de la instruisto, kiu estas ŝargita speciale okupi sin pri iu klaso (klaskuratoro)?
12. Intruistaj kunsidoj?
13. Konsiliĝoj inter gepatroj kaj intruistoj?
14. Fino de la kurso-ekzamenoj kaj diplomoj?
15. Preparado de la intruist-kandidatoj?

AVIZO!

LA TUTMONDA ASOCIO DE GEINSTRUISTOJ ESPERANTISTAJ (T. A. G. E) stariĝis Internacian Korespondadoficejon por Geinstruistoj kaj Gelernantoj. — Ĉiuj, kiuj deziras interkorespondadi kun alilandaj gekolegoj aŭ gelernantoj, sendu siajn adresojn al la sekretario de T. A. G. E. — Oni senpage presigos la adresojn en I. P. R. kun ordinara mallongigoj. Se oni deziras tujan respondon aŭ specimenan ekzempleron de I. P. R., tiam sendu unu respondkuponon. La adresoj estos almenaŭ presigataj sesfoje jare. Petu pluajn informojn de la sekretario

K. H. SPORTEL

**Nieuw-Scheemda (Gr.) — Nederlando.
Poŝtĉekkonto 100053.**

NI TRE AFABLE PETAS NIAJN ABONANTOJN, ŜULDANTAJN ANKORAŬ LA ABONON POR J. 1937 PAGI LA ŜULDON JE NIA KONTO PKO Nr 406.660.

UWAGA!

Wszelkie wpłaty abonamentu miesięcznika „Pola Esperantisto“ skutecznie można na konto PKO. Nr 406.660 lub **przekazem rozrachunkowym, kartoteka Nr 29**, co zaoszczędzi wpłacającym koszty przesyłki.

P O L L A N D A K R O N I K O .

BIAŁA PODLASKA. S-ano Ludwik Stalewski, delegito de I. E. L., aranĝas Esperantan Ekspozicion. La malfermo okazos la 3 de aprilo k. j. pere de Urbestaro S-o Inĝ. A. Walawski; la Ekspozicio daŭros ĝis 7 de aprilo.

KRAKÓW. Societo Esperanto aranĝas ĉiumarde je la 8-a horo vespere popularajn prelegojn en esperanta lingvo je diversaj temoj. Okazis jenaj:

- 18/I 1938. F-ino Olga Goldmann: „La vivo komenciĝas post kvardek jaroj“, knn diskuto.
- 25/I „ S-ro H. Schnützer: „Kalevala, epopeo de fina nacio“.
- 1/II „ S-ino Dattnerowa: „Wojciech Kossak, majstro de pola batalistiko“.
- 8/II „ Dro M. Blassberg: „Pri nutraĵoj kaj nutrado“.
- 15/II „ Dro L. Rosenstock: „Fragmentoj el Biblio“.
- 22/II „ Dro H. Dattner: „Mi ne kisas vian manon sinjorino“ kun diskuto.
- 1/III „ S-ino Dro B. Rosenthal: „Pri

arta kreado en hodiaŭa Germanujo“.

11/III „ S-ino N. Dattnerowa: „Pri racia kosmetiko en ĉiutaga vivo“ en pola lingvo kun antaŭprelego de Prof. dro Bujwid.

15/III „ S-ro mgr D. Tydor: Gabriel d'Annunzio. Liaj verkoj kaj vivo“.

* * *

La 20/II okazis ĝenerala kunveno de „Laborista Esperanta Klubo ĉe T. U. R.“, dum kiu oni elektis jenan estraron: Gvidanto - Piotrowski Albin, vic-gvidanto Ranczyński Ryszard, sekretario - Spuner Edward, kasisto - Susuł Bolesław, mastro - Unger Czesław, propagandestro - mgr Ortsmann Juliusz. La estraranoj: Kielbasa Franciszek, Jura Władysław, Fuchs Regina kaj el T. U. R. Pietrucha. La societejo troviĝas ĉe strato Szczyńska 5/IIe. malfermita ĉiutage de sepa vespere. Funkcias jenaj sekcioj: literatura, scienca, drama propaganda kaj horo. Kursoj de la lingvo Esperanto por komencantoj kaj progresintoj. Biblioteko kaj legejo funkcias ĉiutage. Aliĝojn akceptas sekretario ĉiutage de 7 - 9 horo.

DE LA REDAKCIO.

Gratuloj.

Al samideano reg. kons. **Hugo Steiner**, senlaca gvidanto de Esperanto-movado en Aŭstrujo, ni kore gratulas pro la 60 datreveno de lia naskiĝtago kaj deziras pluajn grandajn sukcesojn sur la amata laborkampo.

S-ino Cense ricevis de la Franca Ministro por Nacia Edukado „Akademiajn Palmojn“ pro longa laborado sur la instrukampo. Ni gratulas plej kore.

Korespondoj.

S-ano F.R. Banham, Victoria. Aŭstralio. Ni ĉiam volonte vidas viajn artikolojn kaj presigas tuj en la plej proksima nro de P. E.

Do nauki Esperanta poleca się: **Leo Turno** **Kompletny podręcznik** (Samouczek w 15 lekcjach) **języka Esperanto** (wyd. IV). zł 1.—

Czytanki Esperanckie (Anekdota) dla początkujących oraz średnio-zaawansowanych „ 1.—

Wyższy Kurs języka Esperanto w 10 lekcjach „ 1.—

Słownik esp. - pol. i pol. - esp. (dla wszystkich) „ 1.—

Skład główny:

Dr Leopold Dreher, Kraków, Starowiślna 37.

Konto P. K. O. Kraków, 405.716.

ABONO: jare zł 8.—, duonjare zł 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł 6.—. Eksterlande 7 sv. fr. Aparta numero zł 0.70, duobla zł 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł 30.—, 1/4 paĝo zł 15.—, 1/8 paĝo zł 10.—. Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł 1.—.

PRENUMERATA: rocznie zł 8.—, półrocznie zł 4.—. Dla Towarzystw i grup esperanckich rocznie zł 6.—. Zagranicą: 7 fr. szw. Numer pojedynczy zł 0.70, podwójny zł 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł 30.—, 1/4 strony zł 15.—, 1/8 strony zł 10.—. Korespondencja: małe ogłoszenia z 10 słów (prócz adresu) zł 1.—.

Przekaz rozrachunkowy: kartoteka Nr 29, Kraków 2. — Konto P. K. O. Nr 406.60.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW, LUBICZ 34.